

Studo de Ulrich Lins publikigita de *L'Omnibuso*
La danĝera lingvo Esperanto en la uragano de persekutoj, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 552, 1974.05.08 & 11

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ĉerpante el la bone dokumentita libro de Ulrich Lins, *La danĝera lingvo Esperanto en la uragano de persekutoj*, ni hodiaŭ raportos pri persekuto de la franca registaro kontraŭ Esperanto.

A.- Ju pli Esperanto trovis lokon en la socio, dank' ekzemple al la fondiĝo de Sennacieca Asocio Tutmonda kaj al la amaskursoj por laboristoj en tuta Eŭropo, ju pli esperanto ĉesis esti ignorebla ludaĵo, des pli ĝi altiris la suspekton de tiuj, kiuj timis internaciismon, aparte ties plej konkretan formon : la internacian klasbatalon.

Cl.- « *Venos tempo, kiam oni timos Esperanton, oni ĝin malamos pro la forte ligitaj kun ĝi ideoj de la frateco* », diris la franca verkisto Henri Barbusse, kaj baldaŭ pruviĝis la vero de lia profetaĵo en Francio mem.

A.- La unua registaro, kiu publike esprimis sian malamon al Esperanto, estas la franca registaro. Tio okazis en la jaro 1922, kiam ĝuste oni diskutis pri Esperanto en Ligo de Nacioj.

Cl.- La kontraŭstaro al esperanto fare de la franca registaro unue esprimiĝis per cirkulera ordono. Jen la faktoj. Ni citas Ulrich Lins :

A.- « *Sub influo de la onidiro pri enkonduko de Esperanto en sovetajn lernejojn kaj aŭdinte pri la sennaciiga celo de Sennacieca Asocio Tutmonda, la franca ministro pri publika klerigo, Léon Bérard, sendis la 3-an de junio 1922 cirkuleron al ĉiuj rektoroj de francaj universitatoj ; en tiu li malpermesis instruadon de Esperanto en ĉiuj ŝtataj lernejoj – pro la « danĝeroj », kiujn ĝi « ŝajnas enhavi dum la nunaj cirkonstancoj ».*

Cl.- Jen ero el la cirkulera argumentado :

A.- « *Estus domaĝe, ke la edukado, bazita sur la latina kulturo, kiun ni defendas, povus esti malgrandigata per la plivastiĝo de arta lingvo, alloga pro sia facileco. [...]*

Cl.- *La franca lingvo ĉiam estos la lingvo de la civilizacio. [...]*

A.- *La priesperantaj danĝeroj ŝajnas esti pligrandigitaj lastatempe. Internaciaj organizaĵoj [...] penadas por pliampleksigi la rilatojn inter la Esperanto-grupoj ĉiulandaj. Laŭ dokumentoj, kiujn publikigas iuj el tiuj organizaĵoj, la celo de tiu propagando ne estas ĉefe plisimpligi la lingvaj rilatojn inter la popoloj sed, kontraŭe, forigi, en la formado de la penso, ĉe la infano kaj la maturulo, la ekzistopovon de nacia kulturo. [...]*

Cl.- Ulrich Lins daŭrigas sian raporton dirante :

A.- « *Kvankam la **neŭtralaj** esperantistoj rapidis certigi, ke Esperanto ne respondecas, se « ŝtelistoj kaj banditoj uzas ĝin », Bérard faris eĉ pli por malhelpi ankaŭ la burĝan movadon : Laŭ liaj instrukcioj, la franca delegito en Ligo de Nacioj, la filozofo Henri*

*Bergson, kiu pli frue simpatiis al Esperanto, devis interveni, por ke la Komisiono por Intelektala Kooperado rifuzu studi la demandon de artefarita lingvo. Antaŭ la sama forumo, brazila ministro akre atakis Esperanton kiel **lingvon de mizeruloj kaj komunistoj**. »*

Cl.- En la Centro de Dokumentado kaj Studado pri la Internacia Lingvo, kiu troviĝas en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds, ni posedas arkivajn tekstojn pri tiu lukto fare de la franca registaro kontraŭ Esperanto. Ĉiuj rimedoj estis uzataj por malhelpi al Esperanto akiri oficialan statuson en Ligo de Nacioj.

A.- En 1923 la Komisiono por Intelektala Kooperado de Ligo de Nacioj, la antaŭulo de Unesko, konkludis sian diskutadon malfavore al Esperanto. Venkis la franca registaro. La esperanta danĝero estis for.

Cl.- En septembro 1924 la posteulo de la franca ministro pri publika klerigo Léon Bérard, kiu estas François Albert, decidis nuligi la cirkuleron. Oni povis rekomenci instrui Esperanton en ŝtataj lernejoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon ni raportos pri la persekuto de Hitler kontraŭ Esperanto.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!